

019.941
(048.1)

RECENZOJ KAJ BIBLIOGRAFIO

{172.16:323.381.3} (05) = 089.2(100)

Sennacieca Revuo, n-ro 84, 1956. Eldono de SAT, Parizo. Ĉi tiu numero konsistanta el 56 paĝoj plus kovrilo, kostas 200 fr.fr. kaj enhavas poemojn de N. B(artelmes), J. Baghy, Marjorie Boulton, kaj du poemtradukojn, artikolojn pri Universala Lingvo kaj Kosmopolitismo en la 18-a Jarcento (de A. Caubel), pri Kanado (de F.V.P.), pri Marteno Fierro kaj ĝia aŭtoro (de P. Bosso), pri Sindikata Movado (en Nederlando) (de H. W. Alings), pri La Historio de la Semajno (de St. La Colla), pri Arompraktiko kaj nia Civilizo (de Kosinaka), Pri Liececo de Novaj Prepozicioj (de Régulo Pérez, kiu pledas por pli vasta elprovado de novaj prepozicioj, kiel *far*, uzataj en Scienca Revuo kaj lerte porpledataj far nia redaktoro G. Hamming en „Lingva Kapto de Strukturoj”, Sci. Rev. 1954), pri Medicina Scienco kontraŭ Naturkuracado (St. Vøldan), kaj pri Skribo de Muziko (An Kaŭ). Kiel ankaŭ en pasintaj jaroj Raymond Schwartz vortoĵongle priskribas i.a. nian pozicion post Montevideo kaj antaŭ Strasburgo, kaj plurajn aliajn eventojn de la pasinta jaro. Ankaŭ ĉi tiu kajero estas certe leginda, kvankam al mi persone pli plaĉis la numeroj de 1955 kaj 1954. La artikolo pri Kanado estas lingve ne sen kritikindaĵoj, dum ĝi eĉ tute ne mencias tion, kio por legantoj de Sennacieca Revuo devus esti plej sciinda, nome la revolucio kiu en la okcidento de Kanado sub la nomo „Socikredito” evidente akiris firman pozicion kaj kiu eble kaj espereble en jaroj venontaj konkeros ankaŭ aliajn provincojn de Kanado por fine akiri la potencon en la Kanada parlamento.

W. P. R.

05 = 089.2 : 9148

Norda Prismo, belaspekta gazeto, eldonata en Stokholmo. Ĝi aperas dumonate. Amplekso de la kajeroj: 48 paĝoj kun kovrilo. Redaktoro: F. Szilágyi. Prezo por jarabono: 6 sv. kr. (18 steloj). Bonega estas la unua numero de la dua jaro, speciale dediĉita al Danujo. Ne nur estas ĝia enhavo tre interesa, sed laŭdirde estas ankaŭ ke ĉi tiu numero enhavas multe malpli da preseraroj ol antaŭaj numeroj. Sendube ĉi tiu revuo estas inter la plej bonaj en Esperantujo kaj ankaŭ inter la malplej multekostaj.

W. P. R.

Prospekto de Esperanto-libroj

655.4 = 089.2 : 659.132

Ni ricevis prospekton de la Esperanto-eldonaĵoj de *Esperanto-Verlag- und Versandbuchhandlung Limburger Vereinsdruckerei*, Limburg/Lahn, Germanio.

G. F. M.

91(05) = 089.2

Geografia Revuo, ilustrita organo de Internacia Geografia Asocio, 1-a jaro, n-ro 1, 36 p., 16,5 × 23,5 cm². Redaktoro Tibor Sekelj. Minimume 4 kajeroj jare; la sekvonta kajero 52 p. Abonprezo \$ 1.—; abonebla ĉe UEA.

Kun ĝojo mi anoncas la aperon de nova Esperanta gazeto kaj mi esperas ke ĝia eldonado estos granda sukceso, redakte same kiel finance. Jam pli frue aperis gazetoj promesplenaj, kiuj tamen pro iaj kaŭzoj ne povis esti daŭrigataj: la Voĉo de Islando, Malgranda Revuo, Esperantologio(?) kaj eble aliaj. Tio starigas la demandon kiuj estas la kondiĉoj por sana eldonado de esperanta revuo. Tio estas la precipa demando pri kiu okupas sin la redaktistoj kaj eldonisto de Scienca Revuo. Ĉu la necesaj postuloj estas plenumitaj ĉe du aliaj novnaskitoj: Norda Prismo kaj Nica Literatura Revuo? Mi esperas ke jes. La estonteco respondos. Ĝi decidus ĉu la abonemo kaj la kunlaboremo harmonias kun la redakta kaj eldona penado.

La unua kajero de Geografia Revuo havas jugoslavan aspekton sekve de ĝia hejmlando. Tio ne estas miriga: la jugoslavaj anoncintoj fakte ebligis la aperon. Pro tio kelkaj turismaj artikoloj enpresigis, kiujn oni cetere volonte akceptas. Tamen la redakcio celas prezenti internacian revuon kaj la enhavo montras ke grandparte tiu intenco jam realiĝis. Efektive, en Esperantio gazetoj de nacia karaktero ne estas adekvataj; la merito de nia lingvo estas ke ĝi ebligas mondskalajn eldonojn. Diversaj gazetoj de landaj Esperanto-asocioj ne sufiĉe laŭagas ĉi tiun principon, prezentante artikolojn de internacia intereso kiuj devus publikiĝi en la internacia gazetaro.

Laŭ la enhavo Geografia Revuo celas tiun principon: ĝi enhavas artikolojn pri triboj el Amazonio, pri la geofizika jaro, pri antarktikaj ekspedicioj, pri surgrimpo de kaŭkaza monto, pri trovaĵoj en la Nilvalo kaj la rubrikon „tra la mondo”. Kvar paĝoj prezentas la bultenon de Internacia Geografia Asocio kaj donas ekzemple organizajn komunikojn.

La artikoloj estas facilaj kaj bone verkitaj; kelkaj el ili eble estus pli interesaj se ili pli profunde traktus la koncernajn temojn. Ne jam evidentiĝis ĉu la revuo volas kontentigi turismajn interesigojn aŭ geografajn; eble ambaŭ.

Kun la apero de Geografia Revuo naskiĝas la demando, ĉu ankaŭ estus loko en Esperantio por gefrataj revuoj kiaj Biologia Revuo, Historia Revuo, Fizika Revuo, Psikologia Revuo, ktp. Se jes, ni povas malfondi nian Sciencon Revuon, ĉar ĉiu tia revuo forprenas parton de ĝia laborkampo. Sed ni atendu ĝis la sperto donas la decidan respondon.

La formato kaj aspekto de la revuo estas plaĉaj, nur la paperkvaliton mi dezirus iom pli bona.

G. F. M.